# ESPERANTO 1

Mazi en Gondolando

Deka leciono

# Kelkaj adresoj

- http://la-ondo.rpod.ru/ - "Radio Esperanto" (Kaliningrado, Ruslando).
- http://www.edukado.net – enhavas i.a. trarigardon de kursoj de Esperanto en lernejoj kun kontaktadresoj.
- esp.togo@cafe.tg – kontakto por korespondado en Afriko.
- Decembra "Ondo de Esperanto" rete: http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-nova.htm
- Se vi volus legi la plej novan numeron de FREŜO - vi povas elŝuti ĝin el: http://forum.esperanto.org.pl/viewforum.php?f=10

# **Rakontu**, kio okazis en Gondolando laŭ la scenoj de parto 9.

- Kiu serĉis Amindan?
- Kie ili serĉis ŝin?
- Laŭ kio ili divenis, kion faris Korvaks?
- Kien iris Korvaks kaj Trombo?
- Kiujn planojn havis Korvaks?
- Kiu estas malsata?
- Kion ŝatas manĝi Mazi?
- Kial li ŝatas manĝi horloĝojn?
- Ĉu Karlo estis iam grava?
- Kio li estis?
- Kion iam Korvaks diris al Karlo?
- Kion Karlo kalkulis?
- Kio estis Korvaks?
- Kio volas esti Korvaks?
- Kion rakontis Korvaks al Trombo pri Karlo, Silvja kaj Mazi?
- Kion faris komputilo?
- Kiu kopio de Silvja amis Korvaks?
- Kion faris Aminda?
- Kio poste okazis?
- Kion trovis kaj kion serĉis Karlo, Silvja kaj Mazi?
- Kial Mazi estis malforta?

# DIALOGOJ

<table>
<tr><td>A: Kion vi faris</td><td colspan="2">hieraŭ matene? / hieraŭ tagmeze?<br>hieraŭ vespere? / hieraŭ nokte?</td></tr>
<tr><td>B: Mi</td><td colspan="2">rigardis televidon.<br>aŭskultis muzikon.<br>lernis Esperanton.<br>ludis tenison.</td></tr>
<tr><td colspan="3">A: Kun kiu?</td></tr>
<tr><td rowspan="2">B: Kun</td><td>mia</td><td>amiko / amikino.<br>kuzo / kuzino.</td></tr>
<tr><td colspan="2">Mazi / Karlo /  (ktp.)</td></tr>
</table>

# ***Komparacio:*** *pli… ol…; malpli… ol…*

- Mazi estas pli granda ol Karlo.
- Karlo estas malpli granda ol Mazi.

**Respondu** per la tuta frazo. Formu alternativajn demandojn kaj respondojn.

- Ĉu vi estas pli alta ol …?
- Ĉu ŝi estas pli bela ol …?
- Ĉu li estas pli forta ol vi?

# ***Sufikso -il-***

Objekto por fari ion, instrumento, aparato, maŝino.

- Montr-il-o, tranĉi-il-o, hak-il-o, seg-il-o, labor-il-o, lud-il-o, komput-il-o, il-o.
- Kion oni faras per *tranĉilo (hakilo, segilo, laborilo, ludilo)?*
- Kion montras malgranda montrilo kaj kion granda montrilo de horloĝo?

---

***Strukturo:*** aspekti ...-*a*. Ŝi aspektas ridinda. Kia ŝi aspektas? - Ridinda (Pala).

# ***Prepozicioj:*** *kun, de, por, dum*

- Mi iros kun vi. (Ni iros *kune*.)
- Petro foriris kun amiko. (Ili foriris *kune*).
- Mi revenis de Slovakio.
- Mi ricevis tion de Karlo.
- Jen la donaco por via patro.
- Ĉi tiu libro estas por vi.
- Dum la tagmanĝo mi ne ŝatas interparoli.
- Dum la paŭzo ni babilis pri Mazi kurso.
- Dum Petro laboris, mi ripozis.

---

**Formu demandojn** el la frazoj.

---

- **Divenu:** Kiu besto ĉiam iras kun kolego?

# *Sufiksoj -em-* **kaj** *-ej-*

dorm<u>em</u>a, parol<u>em</u>a, babil<u>em</u>a, forges<u>em</u>a, plor<u>em</u>a, <u>em</u>a.

- Se vi ne dormos suficê, vi estos dorm<u>em</u>a.
- La papago de Maria estas tre parol<u>em</u>a.
- Infanoj estas babil<u>em</u>aj.
- Kiu ofte forgesas ion, estas forges<u>em</u>a.
- Infano estras plor<u>em</u>a.
- Ĉu vi <u>em</u>as lerni?

---

enir<u>ej</u>o, elir<u>ej</u>o, lern<u>ej</u>o, <u>ej</u>o. Kie estas la enir<u>ej</u>o? – Tie!

- **Uzu en frazoj:** Enirejo de lernejo, elirejo de domo, pordo de kuirejo, iri al naĝejo, granda ludejo, vizito de vinejo / kafejo, bona amuzejo.

# Akuzativo de mezuro

- Kiom rapide vi ...-*as*?
- Kiom rapide vi veturas? Mi veturas 80 kilometrojn hore.
- Kiom da pomoj vi aĉetas? Mi aĉetas 2 kilogramojn da pomoj.
- Kiom longa estas la vojo? Ĝi estas longa 580 metrojn.
- Kiom alta vi estas? Mi estas alta (mi altas) 180 centimetrojn.

**Formu** pluajn similajn frazojn (ekz.: Kiom for / varme /-a /aĝa / peza / kostas).

# ***Kelkaj*** utilaj sufiksoj: *-ad, -aĵ, -an, -ar, -er*

- *-ad* – ripetado aŭ daŭrigo de agado: iri, iradi, irado.
- *-aĵ* – konkreta objekto: nova, novaĵo; paki, pakaĵo; aĵo.
- *-an* – membro, adepto, loĝanto: klubo, klubano; urbo, urbano; Brno, Brnano; la sama ideo, samideano; tendo, tendano; kurso, kursanoj.
- *-ar* – grupo, amasiĝo de objektoj aŭ estaĵoj kreanta amasan nocion: vorto, vortaro; homo, homaro, birdo, birdaro; tendo, tendaro; ŝlosilo, ŝlosilaro, aro.
- *-er* – parto da la tuto: fajro, fajrero; ligno, lignero; pano, panero; mono, monero.
- Kombino de sufiksoj: tendo, tendaro, tendarano, tendaranaro.

# *Sufikso -ind*

*-ind* – hodný něčeho:

- Laŭdinda, kompatinda, vidinda, memorinda.
- Vidindaĵo, memorindaĵo.

# ***Kanto*** Mariŝa, la 2-a strofo

**[:**Batas panjo, batas panjo, batas min,
ke mi amas, ke mi kisas knabo vin.**:]**

**Refreno**

# Preparu por studkontrolo:
## (Připravte si k zápočtu:)

Vidindaĵoj kaj memorindaĵoj en via loĝloko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Estu ĉiĉerono por via eksterlanda gasto.